


SUDFRANCIA STELE



Bulteno de la Federacio Langvedoko-Rusiljono
N° 140 - 1a kvaronjaro 1997 - Jarabono : 35 F al

Fédération d'Espéranto du Languedoc-Roussillon CCP 956-28P Montpellier

En Mai, fais ce qu'il te plaît.... *Elzemple :*
 1-4 Mai : *kongrès fédéral et catalan à Figueres*
 10-19 Mai : *festival culturel et congrès européen en Allemagne (Aalen et Stuttgart)*
 17-18 Mai à Toulouse : *"Prima de las Lengas" avec inauguration de l'allée Zamenhof (17), conférence de René Centassi (18)*
 27 Mai-2 Juin : *stage de Batipauze (Agde).*
Ĝis baldaŭ !

Pri la kongreso de Figueres vi ricevis kun la lasta bulteno orangkoloran faldfolion kun ĉiuj detaloj pri la programo, kotiztabelo, aliĝilo kaj mendilo por la manĝoj. La programo komenciĝos ĵaŭde posttagmeze (16a horo : akceptado en la urbodomo kaj kongresinaŭguro) kaj finiĝos dimanĉe kun la tagmeza bankedo (14h30). Ĉiun vesperon estas antaŭvidita arta vespero, ĉiun tagon diversaj prelegoj (la kongrestemo estas pri neregistaraj organizaĵoj kaj internaciaj ri-latoj). La kongresejo estas Casino Menes-tral -Ample, 17. Por pliaj informoj sin turni al KEA, Apartat 290,08200 Sabadell Katalunio (fakso 0034 37163633).

Kunveno de nia federacio okazos sabate inter la 19a kaj 21a horoj.

Pri la aranĝoj en Germanio, vi jam legis la detalan programon en la antaŭa numero. Pri la Prima de las Lengas en Tuluzo, post la prelego de André Cherpillod la 8an de Aprilo, estas antaŭviditaj sabaton la 17an de Majo je la 15a horo inaŭguro de Aleo L-L. Zamenhof en Tuluzo -Les Pradettes, kvartalo Lardenne, apud Chemin du Ramelet -Moundi kaj prelego de René Centassi, kunaŭtoro de la konata libro "L'homme qui a défié Babel..." dimanĉon la 18an de Majo je la 14a h sur placo de Capitole. Pliaj informoj ĉe 05.61.25.55.77 aŭ 05.61.81.95.65. Pri la staĝo en la "Paradizo" de Batipauze vi legis ankaŭ detale en la lasta bulteno. CBE, 9 Rue Georges Picot 34500 Béziers Tel/Fakso 04 67 31 13 18 volonte registros vian aliĝon. Preparu vin lingve por la UK de Montpellier en 98, maje en Agde aŭ Septembre en Sète!


La ĉi-apuda bildo estas fakte afiŝeto kolora kaj en formato A4, havebla de CBE (la aŭtoro estas Jean-Pierre Peray).

ESPÉRANTO

15^{ème} STAGE

DU

27 mai au 02 juin 1997



Agde -Hérault

en maison familiale

dans une oasis proche de la mer et de la ville.

des cours : 3 degrés
débutants, avancé, supérieur
des loisirs :

peinture, théâtre, promenade etc.

pour tous renseignements:

C.B.E.

9, rue Georges Picot
34500 Béziers

Tél. / Fax 0 467.311.318

Enkonduke

Printempas ! Konvalo floras frue ĉi-jare ! La kutimaj printempaj E°-aranĝoj alproksimiĝas, ĉu apude en Katalunio, ĉu malpli proksime en Germanio, ĉu "ĥejme" en Agde. Ankaŭ iom post iom alproksimiĝas la UK de 98; daŭre estas bezonataj homfortoj por deĵori, helpi, interpreti, gvidi, ĉiĉeroni, ktp.

La malnova komputilo, tiom utila por tajpi SFS, denove funkcias (dankon al la Samideano, kiu sin proponis por tajpi kelkajn paĝojn !). Mankas iom detalaj raportoj pri la vivo de la grupoj de nia regiono. Kontribuoj de izolitaj esperantistoj estas ankaŭ bonvenaj por la venonta fojo. Ĉi-foje ni rekomendas kelkajn librojn.

Ni profitu la belan veteron por iom legi en esperanto ! Bonan legadon de SFS !

JH

VIVO DE LA GRUPOJ :

BEZIERS :

Venontaj kunvenoj : 10an de majo kaj 14an de junio, ĉiam je la 14a h kaj duono en la Domo de Asocioj. Tiuj kunvenoj estos gravaj :

-en majo pro la lastaj informoj pri la staĝo (27a de majo ĝis 2a de junio)

-en junio, ĉar ĝi estos la lasta antaŭ la ferioj; ni devos diskuti pri la agadoj en septembro (Aleoj de Asocioj, varbado por la kursoj), ĉu eblus starigi kurson en Pèzenas, aŭ aliuurbe ? datoj de niaj kunvenoj 97-98 (petitaj de la Domo de Asocioj), organizo de Zamenhof-tago (peto de salono).

Kiel vi konstatas, ne mankas temoj, kaj kiel decidi, se ne ĉeestas la grupanoj ? Poste ili dirus : "kial vi ne faris tion aŭ tion?" sed estus tro malfrue. Venu kaj diru viajn opiniojn. Se pro diversaj kialoj (okupoj, vojaĝoj, ktp) vere vi ne povos ceesti, skribu viajn dezirojn, ideojn, sed kompreneble estas pli bone ĉeesti.

Lastaj eventoj : 5 grupanoj partoprenis la Sat-Amikaran kongreson en Limoges, kaj rakontis entuziasme siajn plej rimarkindajn memoraĵojn.

La 10an de Aprilo la grupo akceptis S-ron Cherpillod. Li prelegis pri la problemoj de lingvoj en Eŭropo. Tre interesa prelego, bedaŭrinde ne multaj homoj venis ; eĉ la grupanoj ne venis amase ! Ni dankas kaj gratulas tiujn, kiuj klopodis por kuraĝigi nian laboron. Ĉu la horo, dato, loko ne taŭgis ? Ĉu tro bela vetero ? Oni ne povas ĉiujn kontentigi, evidente ; ni konscias pri tio. Tamen... ĉu esperanto povas progresi, se eĉ la konvinkitoj forlasas la aferon ? Ĉu ili rajtos plendi ?

Ni ne povas jam anonci la daton de nia septembra kunveno. Post la decido en junio, vi scios.

Bonajn feriojn al ĉiuj...fine de Junio !

Lastminute : la grupo de Carmaux konigis al ni la organizon de sia esperanta festo : la 22an de junio. Se vi deziras ĝin partopreni, informu vin ĉe CBE, 9 Rue G. Picot, 34500 Béziers.

MONTPELLIER :

Prelego de André Cherpillod la 9an de Aprilo en "Maison pour Tous Boris Vian".

26 homoj ĉeestas, inter kiuj deko da esperantistoj. Thierry Saladin rapide enkondukas la temon : "Eŭropo, sed kun kiu lingvo ?". Nun, 11 malsimilaj lingvoj en Eŭropa Unio, morgaŭ, eĉ postmorgaŭ 30 lingvoj, ĉirkaŭ en 2020. Jen la problemo.

Li prezentas André Cherpillod, sian amikon de 25 jaroj, eksprofesoron en liceo, kiel amatoran fakulon pri historio kaj lingvoj.

André Cherpillod argumentas precipe pri mono, ĉar kun 11 malsimilaj lingvoj bezonatas 110 tradukistoj en iu ajn eŭropa kunveno, tio estas (kun paperoj, aparatoj, sekretariejoj, ktp) 500 miliardoj da frankoj ĉiujare pagitaj per impostoj.

Certe ekzistas pluraj solvoj :

1) la latina lingvo, neŭtrala sed malfacilega.

2) alpreni lingvon de unu el la eŭropaj statoj. Kiun ajn lingvon tian oni alprenas, temas pri nacia lingvo, malfacila lingvo, kaj homo bezonas milojn kaj milojn, eĉ dekmilojn da horoj por majstri ĝin.

3) tradukmaŝino : teorie, temas pri bona sistemo sed praktike !!! Ekzemple : kiel maŝino tradukus "le pilote ferme la porte"? Ĉiu vorto de tiu frazeto havas almenaŭ 2 signifojn.

4) restas la solvo : Lingvo internacia aŭ esperanto. Esperanto estas facila, pli precize : pli facila ol aliaj lingvoj, estas logika lingvo, ĉar ĝi uzas "l'assimilation généralisatrice", kiun cetere uzas ĉiuj infanetoj en siaj propraj, patrinaj lingvoj, precipe kiam ili eraras.

Konkludo : arabajn ciferojn homoj adoptis post pli ol 1000 jaroj, do ankaŭ esperanton homoj adoptos sed post kiom da tempo ?

Thierry Saladin denove alparolas geĉeestantojn, por unue bedaŭri la malĉeeston de geinstruistoj, due prezenti la esperantan movadon (asocioj, revuoj, kongresoj, renkontoj, staaĝoj...), anonci venontan UK-on en aŭgusto 1998 en Montpellier, kaj ankaŭ alian tian prelegon, kiu okazos eble la 17an de oktobro en Maison pour Tous Marcel Pagnol en Montpellier.

L.E.

PERPIGNAN : **Esperanto en kolegio.**

La 18an de februaro okazis en la kolegio de Saint-Estève, urbeto apud Perpignan, prezentado de esperanto, fare de R. Benazet, antaŭ du klasoj. Ĉeestis kaj aktive partoprenis kvindekda gelernantoj. Post duonhoro da klarigoj, multaj el ili sukcesis skribi kaj parole kompletigi la slipon "premier rendez-vous", ĵus disdonitan.

Antaŭe, en la dokumentejoj, dum du semajnoj estis vizitebla ekspozicio, kies allogajn panelojn ni ŝuldas al la zorgoj de niaj geamikoj Manguine kaj Figueira.

RODEZ : **Vizitoj de du eksterlandanoj :**

En Aprilo sinsekve vizitis nin Evelyne el Kebekio (Kanado), komencantino sed jam sperta en esperanto, kiu restadis tutan semajnon en komunumo apud Rodez, survoje al Svislando kaj kelkaj aliaj eŭropaj landoj (ŝi antaŭvidis plurajn monatojn por tiu vojaĝo) kaj Zdravka el Bulgario, kadre de la prelegvojaĝoj de UFE, kiu parolis pri muziko (ŝi jam estas konata en nia regiono, ĉar ŝi pli frue gvidis ĥorstaĝon en Ariège). Al ambaŭ samideanoj, bonan vojiradon !

TOULOUSE

Dank'al "La Krokodil", dumonata bulteno de la Tuluza E°-kulturcentro, ni estas plene informitaj pri la diversaj projektoj.



La "Prima de las Lengas a Tolosa e a l'entorn" fakte etendiĝos de la 20a de Marto ĝis la 18a de Majo (kompleta programo ricevebla de SFS). Koncerne esperanton, post la prelego de A. Cherpillod la 8an de Aprilo en la Universitato Toulouse/Mirail (ĉeestis deko da gestudentoj kaj alia deko da geesperantistoj), estas planitaj inaŭguro de Aleo Zamenhof la 17an de Majo kaj prelego de René Centassi (eksĉefredaktoro ĉe AFP kaj kunaŭtoro kun Henri Masson de la libro "L'homme qui a défié Babel") la 18an de Majo. Bonan sukceson al tiuj aranĝoj !

El "La Krokodil" ni ŝtelis kelkajn artikolojn por via informado. Ili certe pardonos nin (aliaj ankaŭ ŝtelas informojn de nia bulteno !). Interese legi, kiam ni spertas malfacilaĵojn en nia federacio por trovi respondeculojn, ke en "Midi-Pyrénées" oni ekzamenas la eblecon starigi tie regionan federacion. Bonan sukceson ankaŭ al tiu klopodo, ĉar Esperanto ne progresos sen la nepra kunlaborado de la esperantistoj, ĉu izolitaj, ĉu en grupoj.

Kalendaro

- 08.04 marde: Prelego **Cherpillod**. 12h30 Universitato **Le Mirail**, AR31 (L'Arche)
- 25.04 vendrede: Kunsido ĉe **EKC**. 18h00
- 01-04.05: Interpirena Kongreso en **Figueras**, Katalunio
- 09.05 vendrede: Manĝo-Klaĉo. 20h00 (konfirmote)
- 10-13.05: Esperanto-Kultur-Festivalo
- 15-16.05: Eŭropa Junulara Parlamento
- 16-19.05: Eŭrop-Unio Esperanto-Kongreso
- 17.05 sabate: Inaŭguro de Strato **L.L. Zamenhof**, kvartalo **Lardenne**. 15h00
- 18.05 dimanĉe: *Prima de las Lengas*: **Forumo sur Capitole-placo**. 10h00 ĝis noktigo.
Prelego de **R. Centassi**. 14h00
- 06.06 vendrede: Manĝo-Klaĉo. 20h00
- 21-22.06: Festo en **Carmaux** (81)
- 04.07 vendrede: Manĝo-Klaĉo.

La 18-an de oktobro 1996 la tuluza urbestro decidis nomi kelkajn novajn stratojn, interalie straton je la nomo de **doktoro Zamenhof**. Temas pri strateto kiu servas novan domaron en kvartalo **Lardenne** (sud-ocidenta urboparto).

EKC organizas inaŭguron en la kadro de la *Prima de las Lengas*, la 17-an de majo je 1500a horo. Ĉeestos **René Centassi** kaj **Raymond Boré** (konfirmote).

Jomo festigos la aferon per siaj viglaj kantoj en dudeko da lingvoj. Ni invitis cetere ankaŭ s-rojn **Baudis** kaj **Jean Diebold** (vicurbestro).

Ni esperas ke la esperantistoj de la tuta regiono venos festi kun ni.

Les émissions de radio

- **Lundi 20h-21h**, Canal Sud, 92,2 MHz, avec un grand jeu-concours chaque 1^{er} lundi du mois. Animateurs: Flo, Christine, Sylvie, et Yves.
- **Mercredi 9h30-9h45**, Radio Mon Païs, 90,1 Mhz. Maurice Issert.
- **Mercredi 18h-19h**, FMR, 89,1 MHz (rediffusion de l'émission de lundi).
- **Jeudi 19h-20h**, Radio Occitania, 98,3 MHz. Flo et Rikardo.

Le **F**ait du jour

Midi Libre

17.04.97

Une conférencière bulgare en visite hier à la MJC

Espéranto : la belle idée du "doktoro" délie les langues

Cette langue "auxiliaire" internationale a été créée à la fin du 19e siècle. Elle continue d'attirer les polyglottes curieux, sans faire parler d'elle

■ Espérantistes ou espérantophiles, ils sont une poignée de Ruthénois à apprendre les principes établis par le bon "Doktoro esperanto".

Depuis 1887 et la parution de son manuel de "Langue internationale", la belle idée de Ludwik Zamenhof, linguiste et médecin polonais, a fait des émules sur la terre entière, sans bruit.

Basé sur la simplicité grammaticale et empruntant ses bases aux langues romanes, l'espéranto gagne chaque année de nouveaux polyglottes pour d'évidentes raisons d'apprentissage : *"C'est une question de temps. Pour l'espéranto il faut une initiation de 250 h.*

Pour l'anglais il faut compter un rapport de 1 à 10 » explique Bernard Legeay, l'animateur de la MJC.

Dans le cadre de son cours, il recevait hier Zdravka Bojceva, jeune Bulgare professeur de chant et de musique.

Une occasion pour les "Ruthénois" de se familiariser avec la "langue des voyageurs".

Mais également, en conformité avec l'esprit "humaniste, universaliste" initié par le "Doktoro", de découvrir une autre réalité, d'autres coutumes au fil d'une conférence comme les espérantistes en organisent tout au long de l'année.

Pour Zdravka, l'avantage de la pratique espérantiste réside d'abord dans la facilité d'approche des individus.

"C'est un moyen de connaître des gens, de s'enrichir", par le biais d'une lan-



Bernard Legeay en compagnie de Zdravka Bojceva ou le plaisir de communiquer facilement avec l'espéranto.

gue commune maîtrisée de manière équivalente par chacun.

"Cela m'a aussi permis d'apprendre d'autres langues,

le français par exemple » ajoute l'espérantophile venue de l'Est.

Elle aura bientôt l'occasion de vérifier ses progrès : en

1998, le congrès international des Espérantistes, soit plus de 3000 personnes venues de 70 pays, se déroulera à Montpellier.

*NDLR : Lastminute alvenis raportoj (gazet-
-eltondaĵoj) pri la vizito de Zdravka Bojčeva
(Bulgario), menciita en la rubriko pri Rodez.
Tutescepte ili aperas sur 2 paĝoj (ĉar la bulte-
-no estis jam preta; SFS konsistas el 12,14 aŭ
16 paĝoj), eĉ kun la fotoj -Bernard pardonos,
se li aperos tute nigra...pro la presado- ĉar ili
estas bona ekzemplo de tio, kion grupoj povas
fari.*

*Estas vere, ke Zdravka estas neordinara persono,
fakulino pri muziko kaj kantado, kaj ke ŝi ravis
nin ĉiujn. Notinde, ke la gazetoj en Rodez kuti-
-me nek tre favore nek tre volonte raportis ĝis
nun pri la vojaĝprelegantoj. Ĉifoje, ili detale kaj
favore raportis, eĉ intervjuis kaj konstatis, ke E^o
funkcias kaj vivas. Rekordanta nombro (27 homoj)
partoprenis la prelegon de Zdravka. Do, se
preskaŭ 30 homoj -ne nur esperantistoj- povas
kolektiĝi en malgranda urbo kiel Rodez, kial ne
eblas fari same en pli grandaj urboj ?*

*La unua titolo povas esti tradukita tiel : "Espe-
-ranto, la bela ideo de la "doktoro", liberigas (aŭ
senbridigas) la langojn". Dankon, "doktoro" !*

mji
RODEZ

CENTRE
PRESSE
15/04/97

LES CLUBS

Club Esperanto à l'écoute d'une « voix bulgare »

Dans le cadre de ses activités « rencontres et conférences », le club Esperanto de la MJC de Rodez recevra, le mercredi 16 avril, à 20 h 30, dans les locaux de la Maison des jeunes et de la culture, Mme Zdravka Bojčeva, espérantiste bulgare et professeur de musique et de chant.

Elle nous proposera une conférence, avec projection de diapositives et cassette vidéo, sur l'histoire de la Bulgarie, ses chants et sa musique populaires.

Nous invitons tous ceux qui sont amateurs de traditions et curieux de l'histoire de se joindre à nous pour cette soirée, ils pourront ainsi en savoir un peu plus sur le fameux « mystère des voix bulgares » et aussi sur ce petit pays peu connu, la Bulgarie. Une discussion sur ces thèmes pourra être envisagée après la conférence.

A noter que les propos de notre invitée seront traduits simultanément de l'espéranto au français par un membre du club et pour ceux qui le souhaitent, nous pourrions fournir toutes informations concernant la langue espéranto et le fonctionnement du club.

Venez nombreux. L'entrée est gratuite et ouverte à tous.

Pour tous renseignements, contactez la MJC de Rodez, tél. 05.65.67.01.13 ou M. Bernard Legeay, tél. 05.65.67.10.72.

CONFÉRENCE

La voix bulgare de l'espéranto

Zdravka Boytcheva est professeur de piano et de chant à Sofia. Mais hors ses gammes et ses élèves, elle court l'Europe pour faire partager l'histoire de son pays, sa culture, sa musique — le mystère des fameuses voix bulgares — avec l'espéranto pour outil de communication.

Hier, Zdravka (traduisez Santé) a fait une halte à la MJC de Rodez, invitée par le club espérantiste local. Entre le président Bernard Legeay et son invitée la discussion, joliment nourrie d'accents latins, va si bon train que l'on prendrait l'espéranto pour langue de la rue. Ce n'est pas (encore) tout à fait le cas.

La langue internationale est parlée certes au sein de quelques familles et de sociétés qui fleurissent (en France très bien) un peu partout, mais on n'est pas encore à la veille d'en faire commerce. Tant mieux ! se réjouit presque Bernard Legeay car lorsqu'une langue sert l'économie, elle n'est pas loin de servir la guerre, et il ne voudrait surtout pas entendre l'espéranto sur un champ de bataille.

Cela irait forcément contre la philosophie de cette langue — la seule au monde peut-être à porter une connotation philosophique — humaniste et fraternelle.

Hier, Zdravka Boytcheva était là

pour en témoigner, usant de l'espéranto pour offrir à son public la richesse de la musique bulgare et la

culture de son pays.

Avec toujours en bouche cette manière « d'espérer » qu'une lan-

gue, un jour, réunira les peuples.

Contact club Esperanto à la MJC au 05.65.67.01.13.



Zdravka Boytcheva, invitée par Bernard Legeay, président du club ruthénois, à parler en espéranto de la culture bulgare.

CENTRE
PRESSE

17 04 97

INTERNACIA ESPERANTOSEMAJNO SEMAINE INTERNATIONALE D'ESPERANTO

SETE (FRANCIO) : 08 - 09 - 97 → 15 - 09 - 97
ALIĜILO (BULLETIN D'ADHESION)

Familia Nomo
(Nom)

Persona Nomo
(Prénom)

Adreso (Adresse)

Tel. Num.
(N° de tél.)

⁽¹⁾ Mi loĝos en la familia domo "Le Lazaret"
(Je logerai à la Maison "Le Lazaret")

⁽¹⁾ Mi Antaŭmendas unu liton
(je réserve un lit)

⁽¹⁾ en unpersona ĉambro
dans une chambre pour une personne

⁽¹⁾ en dupersona ĉambro
dans une chambre pour deux personnes

⁽¹⁾ Mi ne loĝos en la familia domo "Le Lazaret", sed mi manĝos regule.
je ne logerai pas à la Maison "Le Lazaret" mais j'y mangerai régulièrement.

⁽¹⁾ forstreu la neutilan linion
(rayer la mention inutile)

ESPERANTO 5 Rue du Docteur Roux, 34090 Montpellier (Francio)

Poŝta ĝirkonto en Francio : CCP n° 2361 61 T Montpellier


CENTRE CULTUREL ESPERANTO-SEMAINE INTERNATIONALE

ATTENTION !!!

ATENTU !!!

Bonvolu aldoni koverton kun via adreso
(Veuillez joindre une enveloppe avec votre adresse)

Internacia Semajno



ce méditerranée

INTERNACIA SEMAJNO ESPERANTISTA

La Kultura Centro de Montpellier proponas al vi lerni aŭ perfektigi vian scipovon pri Esperanto.

Profitu, samtempe trapasi agrablajn feriojn en la havenurbo SETE, en ripoza parko de pluraj hektaroj ĉe Mediteranea bordo, dum ideala periodo pro la bona vetero sed ekstere de la somera troahomamaso.

Ĉe ni vi ĝuos plurnivelajn kursojn kaj, ankaŭ... banadon, fiŝkaptadon ekskursojn kaj ... bonan manĝaĵon.

SEJOUR LINGUISTIQUE AU BORD DE LA MER

Le Centre Culturel Espéranto de Montpellier vous propose d'apprendre ou de vous perfectionner en Espéranto.

Profitez en même temps de passer d'agréables vacances à SETE, dans un parc reposant de plusieurs hectares au bord de la Méditerranée pendant une période idéale jouissant d'un temps excellent et en dehors de l'afflux estival.

Chez nous vous pourrez suivre des cours de plusieurs niveaux mais aussi profiter de baignades, pêche, excursions et... bonne nourriture.

SEMAINE INTERNATIONALE D'ESPERANTO

23 -a INTERNACIA SEMAJNO DE ESPERANTO

08 - 09 - 97 → 15 - 09 - 97

"LE LAZARET" SETE (FRANCIO)

Adresse pendant la semaine : Maison Familiale "Le Lazaret"
Adreso dum la semajno) : La Corniche 34200 Sète (Francio)
Tél. : 04 67 53 22 47

Programme : *Matinée : Cours de plusieurs niveaux*
Programo : *Matene : Diversnivelaĵoj kursoj*
Après-midi : excursions, cours ou temps libre
Posttagmeze : ekskursoj, kursoj aŭ libera tempo
Soirée : programme culturel ou divertissements
Vespere : amuzaj, distraj kaj kulturaj programoj

Excursions : *nombreuses possibilités sur place.*
Ekskursoj : multaj eblecoj surloke

Adhésions : *250 FF avant le 1er juin*
Aliĝkotiĝoj : *250 FF antaŭ la 1-a de junio*
350 FF après cette date
350 FF post tiu dato
gratuit pour les jeunes de moins de 26 ans
senpaga por gejunuloj malpli ol 26 jaroj

Logement : *Au Lazaret, les prix sont les suivants pour une semaine*
Loĝado : *En la familia domo, jen la prezoj por unu semajno :*
1 personne dans une chambre d'une personne : 1700 FF
1 persono en unupersona ĉambro : " FF
1 personne dans une chambre pour 2 personnes : 1530 FF
1 persono en dupersona ĉambro : " FF

Les prix comprennent la chambre et 3 repas par jour.
La prezoj entenas loĝadon kaj tri manĝojn tage.
La Maison est adaptée aux personnes utilisant des fauteuils roulants.
La familia domo taŭgas por rulseĝuloj.
Possibilité de camping.
Eblas tendumi.
Des hôtels sont aussi à votre disposition.
Ankaŭ hoteloj estas je via dispono.

Réservation du logement : *Valable après paiement d'une avance de 400 FF*
Mendo de loĝado : *Valoras nur post antaŭpago de 400 FF*

Date limite d'inscription : 15 - 07 - 97
limdato por aliĝo :

Renseignements, réservations, informations
Aliĝoj, informoj, klarigoj

ESPERANTO - 5, Rue du Docteur Roux, 34090 Montpellier - Francio, Tel. : 04 67 54 15 43
Veillez joindre une enveloppe avec votre adresse.
Bonvolu aldoni koverton kun via adreso.

UK 98

Multaj samideanoj esprimis la deziron scii pli pri la UK 98. Ni ĝojas pri tiu interesiĝo kaj esperas, ke tio instigos ilin baldaŭ sin aldoni al la listo de tiuj, kiuj sin deklaris pretaj helpi dum la kongreso.

Aldone al la raporto de J.Bony dekstre, jen kelkaj informoj pri la kongresejo mem "Corum", kiu situas apud la urbo-koro.

Espereble la bildoj kaj mapetoj estos sufiĉe klaraj. La kongresejo estas moderna konstruaĵo, bone ekipita por kongresoj. Jen la pri-skrivo de ĝi franclingve, laŭ dokumento eldonita de Le Corum: "Le Corum, 1° centre européen de communication et d'échange, dédié à la culture et aux affaires, réunit en un site unique 3 auditoriums (Berlioz 2010 places, Pasteur 745, Einstein 318), des espaces d'exposition et de réception, des salles de commission...

La sobriété de l'architecture, la qualité des prestations, le dynamisme économique et culturel de la destination, alliés aux charmes et à la qualité de la vie de Montpellier et de sa région, donneront à vos manifestations une nouvelle dimension".

Ĉu ankoraŭ mankas argumentoj por vin venigi al la UK? Baldaŭ disponeblos aliĝiloj!

Pri la 83a UK de 1998 en Montpellier

Estis elektitaj novaj Prezidanto : Cl Nourmont (kiu anstatauas L.Ensuque), Vicprezidanto : JF Passarella (kiu anstatauas J Bony)

Definitiva listo de LKKanoj - respondeculoj- proponita al UEA : Prezidanto Cl Nourmont , Vicprezidentoj Y.Vieme, JF Passarella , kongresejo Y.Vieme , infankongreseto JF Passarella , sekretario L.Ensuque , kasisto G.Passarella , informado/ekstera G.Paing, B.Flochon , interna J.Bony , kongresa kunero Jorgos(G.Comte) , logado H.Olek , programo B.Legeay , artaj arangoj F.Martorell , akcepto, bonveniga servo A.Tora , gicetoj L.Mann , turismo J.Henin , komercaj rilatoj B.Flochon , junularaj aferoj JEFO

Unua Bulteno : ankoraŭ ne preta (malfacilege trovi sponsorojn)

Stampilo, glumarkoj (2a eldono) uzebaj

Informiloj - esperantlingve : Kiel atingi Montpellier + kelkaj praktikaj informoj (nepre memoru ke la Kongresejo situas en la centro de Montpellier)

- franclingve : Por prezenti UEA-n kaj UK-on al la invititoj du folioj estas preparataj kaj sendotaj

Gemelaj urboj de M. : Esperantistaj kontaktoj estas serĉitaj , 2 urboj/5 respondis


Infankongreseto : Ĝi okazos en Sommières (30 km de Montpellier) pli precize en CART (Centre Animation Rencontre Tourisme) K.Fettes, la UEA-respondeculo intencas viziti la LKK-respondeculon (JF Passarella) kaj ambau vizitos Sommières

Stago por trejnado de ciceronoj kaj interpretistoj estas planita



Adreso de la LKK : 7 rue Gustave 34000 MONTPELLIER

Telefono 04 67 54 15 43

Faksilo 04 67 58 79 61



El la stacidomo



El la Béziers

marbordo

Sat-Amikara kongreso en Limoges (29-31 III)

Bone organizita kongreso (manĝoj en la kongresejo, hoteloj apude). Aliĝis 300 personoj. Ges.Robineau prezentis lumbilde sian 8jaran vojaĝon tra la mondo (detaloj en la venonta SFS pri ilia libro).La "Kompanoj" el Bordoza brile ludis "la Pariza Komuno". Hispana poeto kaz folkloro grupo ankaŭ ravis ĉiujn.

R.Grandière rezignis pro sanstato pri la prezidanta posteno,lin anstataŭos J.Selle, ĝis nun redaktoro de la asocia bulteno.Kiel kutime ampleksa libroservo; fine de 97, la nova PIV estos preta.Speciala aranĝo ebligis, kontraŭ helpo por purigado, pretigo kaj servado de la manĝoj,muntado/malmuntado de ekspozicioj,ricevi senpagajn

Aŭgsburgo gastigos la 70an SAT-kongreson



Sennacieca Asocio Tutmonda kongresos en Germanio de la 2-9 aŭg 1997. La organizan komitaton gvidas Hermann Schmid, Waterloostrasse 21, 86165 Augsburg, Germanio; tel: +49 821 792835.

Aŭgsburgo estas ne nur taŭga kongresurbo, ĝi estas ankaŭ interesa kaj vidinda por ĉiuj turistoj. Unu el la plej famaj vizitobjektoj estas Fuggerei, la plej malnova sociala loĝkolonio

en la mondo. Ĝi estis fondita en 1519 de la grafoj de Fugger (la plej riĉa gento tiutempe en Eŭropo) kaj destinita por malriĉaj civitanoj de Aŭgsburgo. La jara luprezo por tiuj loĝejoj ankoraŭ nun estas nur 1,71 markoj, do vere tre modera, ĉu ne?

Vi certe rigardos la restaĵojn de la iama murego, siatempe ĉirkaŭinta la tutan urbon. La urbo-domo estis finita en 1620. La konstrumajstro estis Elias Holl,

kiu donis al la urbo apartan renesancan noton, pere de pluraj gravaj konstruaĵoj. Multaj inventemaj kaj kreemaj homoj, samkiel famaj artistoj, naskiĝis aŭ vivis en Aŭgsburgo. Ni menci Rudolf Diesel, inventinton de la dizel-motora, kaj Bertoldt Brecht. La patro de Wolfgang Amadeus Mozart naskiĝis en Aŭgsburgo kaj, kvankam li transloĝiĝis al Salisburgo, li volonte memoris pri sia naskiĝ-urbo. La filo same volonte gastis tie. Multaj artaĵoj, el la iam famaj orforĝistoj, kaj pentraĵoj en muzeoj kaj artgalerioj, atestas pri la arta glorepoko de Aŭgsburgo.

La multaj pontoj kaj pontetoj trans kanaloj, riveroj kaj riverejoj ebligas komparon kun Venecio. Mallarĝaj stratetoj, pentrin-daj stratanguloj, kiuj alternas kun larĝaj stratoj kaj parkoj, donas al la urbobildo unikan ĉarmon. Vi troviĝas kaj en mezepoko kaj en moderna tempo. Vi certe admiros la relative multajn fontanojn, sur publikaj placoj kaj en parkoj.

de ekspozicioj,ricevi senpagajn manĝojn. Infankongreseto arigis dudekon da geknaboj.

EsperantOC celas alproksimigi la okcitanistojn kaj esperantistojn. Redaktas la informilon

↓ Daniel Pfeiffer, Münsterer Strasse 5, D 60326 Frankfurt am Main, al kiu oni povas sendi unu aŭ du respondkuponojn por ricevi la venontajn bultenojn



Amistat ambe les esperantistas.
Amikeco kun la okcitanajoj.

<http://www.k.shuttle.de/fs1003/EsperantOC>

Editorial : Perché ?

Perqué EsperantOC, le darrièr-nascut de la premsa occitana, ven d'Alemanha ? Perqué es un alemand que s'en tracha ? De tot prumièr, una rason personala : fasquèri mos estudis a Tolosa e i ai una filha plan aimabla. Çaquelà i a benlèu cent milieirats d'estudiants dins la vila mondina, e son pas totis occitanofòns. Ieu al mens agèri pas jamai una informacion sus la vertadièra lenga del país de l'universitat Pau Sabatièr.

Mas ai totjorn sauput qu'al miègjorn i a mai qu'una lenga. Ne saupèri pas l'espandiment, nimai l'istòria, mas al mens l'existencia. L'istòria de Catinon e Jacotin a la Despacha èra incompreensibla per ieu e quelques unes que demandèri me respondèron que òc, saupèron la parlar, mas agèri pas le mendre exemple d'aquela lenga misteriosa.

Finalament comprenuèri çò que vòl d'iser estre eperantista : Ja fasquet d'anadas que presiquèri l'importancia d'aquela lenga antiimperialista, que daissa le dreit als parlaire de tota lenga que siá granda o pichonèla. Le dreit de parlar la lenga mairala sense vergonha tot en agent la possibilitat de parlar a totis sense excepcion. I a pas d'autre lenga que l'esperanto per permettre aquò, pr'amor que le autris coma l'inglès son de tot evidencia fòrça tròp complicadas. E subretot darrièr tota altra lenga i a totjorn un interés, una volontat d'impausicion.

El la redaktejo: Kial?

Kial EsperantOC, la lasta naskito de la okcitana preso, venas el Germanujo? Kial estas Germano kiu okupiĝas pri ĝi? Antaŭ ĉio, persona tialo: mi studis en Tolosa kaj mi tie havas amindan flinon. Tamen estas cent miloj da studantoj en la tiu urbo, kaj ili ne ĉiuj estas okcitanparolantaj. Almenaŭ mi neniam ricevis informon pri la vera lingvo de la lando fare de la universitato Pau Sabatièr.

Sed mi ĉiam sciis ke en la franca sudo estas pli ol unu lingvo. Pri ĝia areo aŭ historio mi nenion sciis, sed almenaŭ ĝian ekziston. La historio pri Catinon kaj Jacotin ne komprenoblis por mi kaj kelkaj homoj al kiuj mi demandis respondis ke jes, ili kapablis la linguon, sed mi tute ne ricevis ekzemplon de tiu mistera lingvo.

Finfine mi komprenis kion signifas esti eperantisto: jam de kelkaj jaroj mi predikis la gravecon de nia lingvo kontraŭimperiista, kiu lasas sian rajton al la parolantoj de ĉiu ajn lingvo, ĉu granda aŭ malgrandega. La rajton paroli la gepatran linguon sen honto, havante samtempe la eblecon senescepte paroli al ĉiuj. Ne ekzistas alia lingvo krom esperanto kiu permesas tion, ĉar la aliaj kiel la angla estas tro komplikaj. Kaj plejgrave, malantaŭ ĉiu alia lingvo estas iu intereso, ia volo de altrudo.



KASTELO GRESILLON KULTURAJ ARANĜOJ 1997

*"VERA OAZO EN LA DEZERTO
DE LA LINGVA KONFUZADO"*

Kompleta programo kun kondiĉoj havebla ĉe
ESPERANTISTA KULTURDOMO,
Grésillon, 49150 BAUGÉ aŭ ĉe SFS

Interkona vespero: la unuan vesperon de ĉiu periodo.

1° INTERNACIA RENKONTO DE INFANOJ

12/4-19/4: kursoj, promenadoj, distraĵoj, malkovro de ĉirkaŭaj interesaĵoj, iniciado al metiaj laboroj, verkado de staĝ-gazeto.

2° INTERNACIA AMIKA RENKONTO

20/6-5/7: nedeviga programo: kursoj, gvidataj konversacioj, komunaj promenadoj, distraĵaj vesperoj. Deĵorantoj: Pierre kaj Luce Babin.

3° SOMERAJ ARANĜOJ KAJ KURSOJ

6/7-13/7: por komencantoj (1a parto) kaj praktikantoj.

13/7-20/7: kursoj por komencantoj (dua parto) kaj praktikantoj. "Gramatiko" A. Cherpillod gvidos. "Lerni la Francan lingvon per Esperanto": J. Vincent gvidos. 20/7-27/7: kursoj por komencantoj (unua parto) kaj praktikantoj. "Traduko" (el la franca lingvo): Georges Lagrange gvidos. Ekskursoj, distraĵoj,...

27/7-3/8: por komencantoj (2a parto) kaj praktikantoj. 3/8-10/8: kursoj por komencantoj (unua parto), praktikantoj kaj lertuloj, ekskursoj, promenadoj.

10/8-17/8: kursoj por komencantoj (dua parto), praktikantoj kaj lertuloj. "Kiel komenci instrui la lingvon Esperanton?": Przemek Grzebowski gvidos.

17/8-24/8: kursoj por praktikantoj kaj por lertuloj.

"Ombroj de kulturo": prelegoj de P. Grzebowski.

LA KVINPETALO -Esperanto-kulturcentro- 86410 Bouresse (Tel.05-49428074)

Majo: 1-4: Piedmigrado (G. Gabillon), 8-11: Astronomio-konstruado de sunhorloĝo (P. Lagrange)

17-20: Tradukado - skriba parto de 3agrada ekz. (G. Lagrange)

Julio: 8-12: Praktikado (D. Baron) samtempe: prelegoj de M. Boulton, iniciado al teatro (S. Bonnet)

15-19: Praktikado 2a nivelo (M-T. Lloancy) Samtempe: " " " "

Aŭgusto: 5-9: Kino en E° (spektado de 16 filmoj, komentoj, kritikoj) kun J. Schiller

